

Ĝenerala membrokunveno de FLEJA je dimanĉo 30a de junio 1991
dum la sonera FLEJA-semajnfino en Eeklo.

Ĉeestantoj: An Alberto, Peter Ameye, Hilde De Meyere, Patrick
Haerick, Lydia Kerremans, Rob Lemeire, Willem Rassaert, André
Huyschaert, Wim Slocmans, Eddy Van den Bossen kaj Jan Vanuytven.

Senkulpigon petis: Stefaan Cottenier kaj Pieter Vets.

TAGORDO

1. Enkonduko:

Protokolanto: André Huyschaert

André bonvenigas la ĉeestantojn. Li prezentas la gisnunajn
estraranojn kaj klarigas la celon de ĉi tiu kunveno: ĉar la
lasta kunveno ne povis okazi ni devas ĉi tie preparoli la agadon
de FLEJA kaj elekti novan estraron.

2. Agado:

2.1 FLEJA (kun)eldonas la revuojn JEN kaj KONCIE, sub redakto de
Stefaan Cottenier.

2.2. La ĉeestantoj kontentas pri ĉi tiu unua sonera semajnfino
de FLEJA. Ili trovas bona la ideon venontjare refoje organizi
renkontigon en la sama ejo, sed la dato sangigu, prefere al
la lasta semajnfino de aŭgusto. Pluraj homoj anoncas sin pretaj
kunlabori. Post diskuto Willem akceptas igi ĉefrespondeculo pri
la organizado (li cetere intencas transpreni la organizadon de la
skisemajnfino de Marie Grela, se tiu ne plu mem organizus, sed
tio okazas ekster la kadro de FLEJA).

3. Estraraj elektoj:

André dankas la eksigantajn estraranojn pro la laboro kiun ili
dum pluraj jaroj faris.

An, André kaj Eddy pretas resti estraranoj. Krome jam
kandidatigis Pieter kaj Stefaan. Anoncas sin ankaŭ Jan kaj Rob.
Laŭ unuanima decido de la ĉeestantoj tiuj 7 homoj formos la
novan estraron. Unua kunveno de la nova teamo, al kiu ĉiuj
membroj bonvenas, okazos en oktobro (detaloj sekvos).